

# juna amiko

novembro 2018 • n-ro 4/2018 (157) ←

PROGRESIGA REVUO  
POR LEGEMULOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ

Ekspozicio “La Lundoj de la Vortoj”.  
Mirinda Kristnasko. Balenoj.  
Louise Weiss. Bertrand Piccard.  
Kantu kun *Juna Amiko*. Malstreĉiĝu  
kun *Juna Amiko*. Emblemokreado  
por la ILEI-Kongreso. UEA – tutmondigo  
kaj reunigo. Reforma krucenigmo.



# Koboldeto

Mi estas  
la reĝo kaj mi ordonas ke  
vi sciigu min kie troviĝas la  
libro pri la eterna vivo.  
Parolu stultulo!

Iam estis avara kaj  
eksploatema reĝo,  
kiu ne sciis legi kaj  
revis vivi eterne.

Laŭ legendo ĝi  
troviĝas en la pinto de  
kaŝita monto, sed...

Silentu! Mi volas havi  
tiun libron kaj vi akompanos  
min al tiu monto.

La vojaĝo estas  
longa kaj malfacila...

Nenio okazis dum tri monatoj...

Mi estas tre laca!

Fine la libro estis trovita kaj la  
maljunulo estis magiisto, kiu  
transformiĝis al birdo.

Reĝa moŝto, vi  
jam havas eternan vivon  
sed vi restos sola...

Se vi povus legi la  
libron vi povus reveni  
sen mia helpo al la  
palaco.

La birdo forflugis kaj la reĝo  
multe bedaŭris ne scipovi legi. Li  
neniam povis reveni  
al la palaco.

Aŭtoro: Miguel Ángel Díaz.

Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco



# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK);

Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ..... 4



**Konversaciaj temoj:** Mirinda Kristnasko (Judit Felszeghy, HU) ..... 5



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 9

**Nature:** Balenoj (José de Jesús Campos Pacheco, CU) ..... 11



Louise Weiss: pacifisto kaj feministo (Renée Triolle, FR) ..... 12



**LUDE, la unika dua etaĝo:** Ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo (Mónika Molnár, CH) ..... 14



**Flugado:** Bertrand Piccard (Mireille Grosjean, CH) ... 16



**Recenzo:** La enigmoj de "La Eta Princo" (Luiza Carol, IL) ..... 17

**Enketo:** Juna Amiko en instruado (Elena Nadikova, RU) ..... 20



**Legu librojn – premioj – konkursoj:**

Kristnasko kun libro. Klubo de bona libro. Ekkonu legendon kaj provu rekonstrui la landon. Legendo pri Sankta Nikolao (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22



**Kantu kun Juna Amiko:** Lulkanto

por galanto (Małgosia Komarnicka, PL/Luiza Carol, IL) ..... 28



**Interkultura Mondo:** La Lundoj de la Vortoj (Elena Nadikova, RU) ..... 30

**Opero:** Va pensiero/Flugu penso (Renato Corsetti, IT/GB) ..... 32



**Malstreĉiĝu kun Juna Amiko:** Braceleto el plasta botelo (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 35

**Konkurso:** Emblemokreado por la ILEI-Kongreso (Aranka Laslo, RS) ..... 34



Japanaj enigmoj (Hori Jasuo, JP) ..... 36



**LASTE:** UEA – tutmondigo kaj reunigo. Reforma Krucenigmo.

(Stefan MacGill, NL/HU) ..... 37

**Eldonanto** de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo**: sub rekonstruo ĉe [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://lernu.net) kaj [edukado.net](http://edukado.net). **Redaktoro**: Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj**: Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj**: Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto**: Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto**: Sebastian Cyprych, [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en februaro 2019. **Limdatoj por sendi kontribuojn**: ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318






## Karaj amikoj!

**L**a frontpaĝa foto kaj la artikolo en la rubriko “Interkultura mondo” konatigos vin kun interesa objekto en Svislando, kiu prezentas, ankaŭ dank’ al Esperanto kaj “nia Mirejo” internacian komunikadon kaj 50 lingvojn!

Proksimiĝas la jarfino kaj la kristnaskaj kaj jarfinaj festoj. Niaj rubrikoj “Konversaciaj temoj”, “LUME”, “LUDE” kaj “Legu kaj ĝuu” alportas pensigajn kaj riĉe ilustritajn legaĵojn pri tiu temo kaj pri la finiĝanta aŭtuna kaj komenciĝanta vintra sezonoj en granda parto de la mondo.

Sur la interna kaj dorsa kovrililo estas du bildrakontoj pri Koboldeto kaj Supernatura lernejo; interne vi trovos artikolojn pri la naturo (balenoj), pri la



fama pacifisto kaj feministo Louise Weiss kaj la svisa psikiatro kaj aerostatisto Bertrand Piccard. Ne mankos legendo pri Sankta Nikolao, recenzo pri bona libro (“La Eta Princo”) kaj invito al Klubo de bona libro (“La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”).

Kun la nuna numero de *Juna Amiko* vi denove povos kanti (“Lulkanto por galanto”), eĉ la plej kantatan operon de la mondo (“Va pensiero/Flugu penso”), konatiĝi kun emblemo-konkurso en Serbio, “Malstreĉiĝi” kaj doni duan vivon al uzitaj plastaj boteloj, kaj admiri japanajn enigmojn.

Cetere – ĉu vi scias, ke nia Universala Esperanto-Asocio reformiĝas, tutmond-iĝas kaj rejuniĝas? Vi povos legi pri tio kaj solvi eĉ krucenigmon en la rubriko LASTE.

Agrablan legadon kaj tre belajn festotagojn!  
Via redaktoro **Stano Marček**

## Karaj legantoj!

**J**en vi tenas en viaj manoj la lastan ĉijaran numeron de *Juna Amiko*. Kiel kutime ĝi estas plena je plej diversaj kontribuoj de nia forta kaj diligenta skipo da rubrikestroj kaj konstantaj kunlaborantoj. Mi uzu tiun ĉi enkondukon por denove kaj elkore danki ilin pro ilia inventemo kaj zorgemo. Same mia danko iras al la kvar provlegantoj. Evidente mi ne rajtas forgesi nian redaktoron Stano Marček, kiu estas majstro en la arto de redaktado kaj engaĝigo.

Meze de tiu kajero vi trovos enketon. Jes ja, gravas por ni



scii pri la deziroj de niaj legantoj, pri iliaj bezonoj, pri iliaj emoj kaj preferoj. Pro tio ni lanĉas tiun enketon. La dokumento ankaŭ troviĝas en la ĉefpaĝo de nia retejo [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

Do ni petas vin nepre plenigi ĝin kaj konigi al ni vian uzon de nia revuo. Ni estas en esploro pri la vojo al kreskigo de la legantaro de JA, pro tio ni devas koni la emojn de la nunaj legantoj. Sugestoj estas bonvenaj!

Kaj nun mi deziras al vi ĉion bonan por la fino de tiu ĉi jaro 2018, feliĉajn festotagojn, ĉu kristnaskajn ĉu aliajn, kaj bonan transjaran gliton, salton al 2019.  
**Mireille Grosjean**  
Prezidanto de ILEI



# Mirinda Kristnasko

Help-materialo por progresemuloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

## I. Grandaj planoj por la granda festo

Dora (D) kaj Johano (J), juna geedza paro, babilas en sia hejmo, tri semajnojn antaŭ Jula Tago, kiam en kelkaj landoj oni kutime festas Kristnaskon.

D – Mia kara, la bofratino telefonis al mi kaj proponis, ke la Kristnaskan Vesperon ni festu kune.

J – Ha, ĉu?

D – Jes, ĉar tie estas kvar infanoj, kiuj nepre volas ricevi la donacojn en sia hejmo, ĉe la ĝisplafona kristnaska arbo.

J – Kvar? Mi sciis nur pri tri, kvankam

unu estas multo por tiaspecaj infanoj...

D – Johano, ne estu maliceta; ili estas tute ordinaraj geknaboj! Ĉu vi forgesis, ke en februaro naskiĝis ilia kvara bebo? Ĝuste tial proponas Adela, ke la familio kunvenu en ŝia hejmo.

J – Vi diras la fa-mi-li-o, ĉu? Kiom ni estos tie?

D – Do, Adela kaj Petro kun la infanoj, krome Panjo kaj Paĉjo, onklino Klara kun sia... fianĉo, kaj ni du. Johano, Kristnasko estas mia plej ŝatata festotago kaj mi ŝatas, kiam la tuta familio estas kune.

J – Eĉ la teleroj por tiom da homoj ne havos sufiĉan lokon sur la tablo! Krome, mi ne aparte ŝatas la fiŝosupon de via bofratino. Kaj, kiam ni vizitos miajn gepatrojn?





- D - Ni povos tagmanĝi ĉe ili la unuan festotagon, se tio taŭgos por ili.
- J - Verŝajne jes, sed mi demandos ilin. Tiel ni povos kune festi, karulino, la duan festotagon, ĉu?
- D - Tiam ne, ĉar mia fratino kun sia edzo kaj iliaj du filinoj nur tiam povus festi Kristnaskon, ja ili nur tiam alvenos de iu vojaĝo, kaj ankaŭ ili deziras renkonti la familion.
- J - Kie?
- D - Ĉe ni, kara.
- J - Sed kial?
- D - Ĉar, mia kara, ĉe mia frato kaj Adela okazos la vespermanĝo dum la Sankta Vespere, tiel logike, ĉu ne, ke ŝi ne okazigu iun plian festenon post du tagoj. Same mia fratino Elinjo ne povus prepari gastigadon, ĉar ili estos alvenintaj ĵus en la antaŭa vespero. Panjo same ne povas kuiri tiom multe; krome ankaŭ miaj gepatroj forveturos tuj post la festotagoj. Tial mi proponis, ke ni povos renkontiĝi ĉe ni.
- J - Tiu ĉi estas tamen nia unua Kristnasko, kune...
- D - Ni ankoraŭ havos multajn, Johano!
- J - Per kio ni povos regali la gastojn?
- D - Pri tio zorgos miaj gefratoj. Adela, kaj Elinjo proponis, ke ili alportos manĝaĵojn. Estos belega festo, kara mia, kaj nia unua komuna Kristnasko! Mi jam antaŭĝojas pri ĝi!



## II. Gravaj detaloj

**Dora (D) parolas telefone kun sia frato, Petro (P) kaj poste kun sia fratino, Elinjo (E), el sia hejmo, dek tagojn antaŭ Kristnasko.**

- D - Ha-lo, ĉi tie Dora parolas. Adela?
- P - Sal' Dora! Adela banas la etulinon nun. Ĉu mi ne konvenas por vi, fratineto?
- D - Petro, certe jes! Temas pri Kristnasko. Mi jam aĉetis donacojn, por Adela mi trovis parfumon, kiun ŝi ege ŝatas...
- P - Diru al mi ĝian nomon, Dora, sed flustre, Adela ne aŭdu tion.
- D - Ĝi estas... (flustras la nomon de la parfumo)
- P - Kaj ĉu vi jam aĉetis ĝin?
- D - Jes ja! Tion mi diris. Kial?
- P - Ĉar mi aĉetis la samon por ŝi. Kion fari nun?
- D - Ne zorgu, Petro. Mi aĉetos ion alian por via edzino. Kaj mi donacos la parfumon al Elinjo.
- P - Vi ĉiam povas solvi la problemojn, fratineto! Por Panjo kaj Paĉjo ni kune donacu ion, ĉu?
- D - Ilia televido jam taŭgas vere nur por rubujo; ni aĉetu por ili novan! Bonvolu elekti por ili la aparaton, ne tro kostan, sed bonan!
- P - Fratineto, kara, vi ja scias, ke mi ne estas spertulo pri teknikaj aparatoj, krome, ni havas tre malmulte da tempo nuntempe, la infanoj... Johano estas pli kompetenta pri teknikajoj kaj li certe helpos vin!
- ....
- D - Saluton Elinjo! Mi vokis vin por precizigi kelkajn detalojn pri Kristnasko.
- E - Saluton Dorinjo, ankaŭ mi jam volis babili kun vi! Ĉu vi jam aĉetis la televidon por la gepatroj?
- D - Jes, ĝi estas bonkvalita; ili certe ĝojos



### III. La tempo alportas la solvon!

Dora (D) kaj ŝia edzo Johano (J), en sia hejmo, babilas kun la kuracisto (K) la antaŭtagmezon de Kristnasko.

K – Kiam komenciĝis via malbonfarto?

J – Nur hodiaŭ matene. Hieraŭ ni ankoraŭ aĉetis la jularbon, butikumis, kaj vespere enpakis la donacojn. Matene mi sentis malvarmon, frostotremis kaj vomis. Ankaŭ en mia stomako mi sentas fortan doloron.

D – Mia edzo eĉ teon ne povis trinki; ankaŭ ĝi tuj eliris el li.

K – Vi havas nur iom altan temperaturon, sed mi donos al vi injekton kontraŭ vomemo kaj vitaminojn. Tion kaŭzas aĉa viruso; bonvolu iri nenien por ne infekti aliajn!

D – Sinjoro Doktoro, ĉu ankaŭ mi povos kapti la viruson? Hodiaŭ vespere jam estos Kristnasko, kaj ni gastos ĉe miaj familianoj...

K – Plej verŝajne jes. Kompreneble ankaŭ vi restu hejme, dum almenaŭ kvar-kvin tagoj! Mi ĉion surskribis; se via edzo aŭ vi fartos pli malbone, telefonu al la deĵoranta kuracisto, aŭ voku la ambulancon! Vi ambaŭ trinku multe da teo kaj restu hejme, en la loĝejo.

J – Kion mi rajtas manĝi?

K – Kiam vi rehavos la apetiton, jam iun malpezan manĝaĵon, ne grasan, ne tre dolĉan kaj sen fortaj spicoj. Espereble vi tre baldaŭ resaniĝos! Serenan Kristnaskon, laŭ la cirkonstancoj! Ĝis revido!

D kaj J – Koran dankon sinjoro kuracisto! Feliĉan Kristnaskon ankaŭ por vi kaj ĝis revido!

(samtage, vespere)

J – Dorinjo kara, ĉu vi vidas, ke ekneĝis nun? Ni sidigu en la brakseĝon apud la fenestro, kaj rigardu la neĝadon!



pri ĝi. Sed nun mi volas scii, kiun manĝaĵon vi alportos por la festo ĉe ni. Petro diris, ke ili eble alportos nur iun biskviton, pli frue aĉetitan, ĉar ili ne trovos tempon por kuiri kaj baki ion ajn.

E – Kiel bone, ke vi nun mencias tion, kara! Mi jam preskaŭ forgesis, ke reveninte el Egiptio ni festos Kristnaskon ĉe vi! Ĉu vi preparos iun bongustaĵon, Dorinjo? Panjon mi ne volas ŝarĝi per plia kuirado; kun Paĉjo ili prizorgas niajn du filinojn, dum mi estos for kun mia edzo.

D – Jes, mi pensis pri rostita anaso, sed Adela diris, ke ĝuste tiu estos la ĉefplado ĉe ili. Pro la infanoj mi preparu ion malpezan, eble kokidaĵon, sed Paĉjo tute ne ŝatas kortbirdojn, ĉu vi povus friti fiŝon por li kaj Panjo?

E – Fiŝaĵo estas bona nur se ĝi estas tute freŝa, Dora! Reveninte el Egiptio mi certe nenie trovos fiŝon por friti, nek ion ajn freŝan. Sed mi provos alporti ekzotikajn fruktojn, se oni permesas tion ĉe la dogano.

D – (Duonvoĉe, nur por si mem, re-kroĉinte la telefonon.) Nu, bonŝance mi vokis miajn gefratojn... Nun mi almenaŭ scias, ke mi devos ĉion mem prepari por la dua festotago.







- D - Ho, vere, kiel bele estas ekstere! Jam malheliĝas; la lampoj flave eklumas kaj neĝeroj sorĉe kirliĝas en la aero. La strato tute silenta, senhoma... kaj la freŝa neĝo kovras jam ĉion. Kiel mirinda vespero! Ĉu vi jam pli bone fartas, mia kara?
- J - Mi jam fartas tute bone, la injekto de la kuracisto resanigis min, kaj certe ankaŭ via bongusta buljono!
- D - Jes, mi preparis la viandojn kiujn mi aĉetis, en la fridujo estas nun buljono, rostita anaso, stufita brasiko kaj por vi terpompureo.
- J - Tiel ni ne malsatmortos. Ĉar, morgaŭ ni same ne povos viziti miajn gepatrojn. Mi jam telefonvokis ilin, deziris al ili serenon festadon kaj diris, ke tiu viruso povus ataki ilin, tial ni prefere restos hejme. Ĉu ankaŭ vi informis viajn parencojn?
- D - Jes, certe! Ĉiuj ege bedaŭris, ke ni ne povos gastigi ĉe ili, kaj deziras al vi tre baldaŭan resaniĝon. Adela detale rakontis, kiel aspektas ilia kvarmetra jularbo, ĝi estas iu speciala abio, kies pingloj longe restas sur la branĉoj, kiel ŝi kaj Petro ornamis ĝin de mateno ĝis posttagmezo. Panjo kaj Paĉjo tiel restados ĉe ili, ankaŭ la duan festotagon, kaj ludos kun la infanoj. Kun Elinjo mi tamen ne povis paroli, ĉar ili jam forveturis al Egiptio, sed mi sendis al ŝi telefonan mesaĝon. Ŝi skribis, ke tie estas bele, varme, sed tamen mankas la kristnaska etoso. Ankaŭ ili deziras belajn festotagojn al ni, kaj resaniĝon al vi.
- J - Dorinjo, poste ni kontrolos, kiel funkcias la televido, aĉetita por viaj gepatroj, kaj ni elektos iun interesan filmon. Sed nun, restu ankoraŭ apud mi, kaj ni ĝuu tiun vintran vesperon! Plej mirinde estas, ke ni povas duope festi nian unuan Kristnaskon!

## TASKOJ

- I. a) Legu la dialogojn, unu post la alia, atente, kaj kontrolu la vortojn nekonatajn. Poste legu ilin denove!
- b) Sen rigardi la tekston, en plenaj frazoj respondu la demandojn:
- Kiel nomiĝas la edzo de Dora, la bofratino de Dora, la frato kaj la fratino de Dora?
  - Kie la familio planas festi Kristnaskon, la vesperon, la unuan kaj la duan festotagojn?
  - Kiuj havas kvar infanojn, kaj kiuj havas du filinojn?
  - Por kiu aĉetis donacojn Dora kaj ŝia edzo kaj kion?
  - Kiuj devas zorgi pri la filinoj de la fratino de Dora?
  - Kio estos la (planita) manĝaĵo dum Kristnasko, kaj kion metis Dora en la fridujon?
  - Kia estas la kristarbo, starigita de Petro kaj lia edzino?
  - Kiu malsaniĝis kaj je kio?
- c) Sen rigardi la tekston, rakontu en 1-3 frazoj:
- Kiel informis Dora sian edzon pri la kristnaska programo?
  - Kian programon preferas la edzo de Dora, dum Kristnasko?
  - Kion petis Dora de sia frato kaj kion li respondis?
  - Kiel volas pasigi la festotagojn la fratino de Dora?
  - Kial vizitis la kuracisto la hejmon de Dora?
  - Kia estis la vetero je Kristnasko?
- II. a) Respondu la demandojn en 1-3 frazoj:
- Kutime kiaspecajn donacojn vi aĉetas por viaj parencoj kaj geamikoj?
  - Kiuj estas la kutimaj pladoj dum Kristnasko?







kaj Novjaro en via regiono (lando), kaj en via familio? • Kiel vi ornamas vian loĝejon, domon aŭ ĝardenon? • Kiel estas ornamitaj la publikaj lokoj (parko, strato, restoracio) en via regiono (urbo)?

• Ĝenerale kia vetero estas en via regiono (lando) fine de decembro? • Kio estas la kutima kristnaska programo en via regiono (urbo, lando)?

**b)** Preparu pertelefonajn salutmesaĝojn por Kristnasko (Jula Festo, Novjaro) en 2-3 frazoj! **c)** Preparu dialogojn, en 4 – 8 frazoj (kun via partnero): • inter vendisto kaj aĉetanto, pri aĉeto de kristarbo • inter edzo kaj edzino pri la festotaga menuo, • inter patr(in)o kaj fil(in)o pri kristnaskaj donacoj • inter vendisto kaj aĉetanto pri aĉeto de parfumo aŭ/kaj televidaparato • inter du geamikoj pri komuna programo dum kristnaska ferio!

**III. a)** Preparu leteron al via esperantista amiko, en kiu vi rakontas, kiel vi deziras pasigi Kristnaskon aŭ Novjaron Feston (en familia rondo), en 12 – 17 linioj! Ne forgesu pri bondeziroj!

**b)** Rakontu, aŭ prezentu skribe en 15 – 25 linioj, kia estas la jula, kristnaska aŭ jarfina festo en via lando; kiel vi preparas vin al la festo, kiel ĝi disvolviĝas, kiujn tradiciojn vi sekvas!

## VORTKLARIGOJ

**Maliceta:** inklina ataketi per ŝercoj. **Sperta:** posedanta sciojn, akiritajn per praktika observado kaj agado, kaj kapabla uzi ilin.

**Kompetenta:** kapabla ĝuste solvi aferon pro sufiĉaj tiurilataj scioj. **Plado:** manĝaĵo.

**Rekroĉi telefonon:** remeti la aŭskultilon sur la aparaton, kaj tiel la telefona lineo, inter la parolintoj, ĉesas. **Jularbo:** abio aŭ pino, kiun oni ornaminte starigas en la loĝejo, ĝardeno aŭ surstrate okaze de Kristnasko, nomata ankaŭ "kristarbo". **Buljono:** filtrita viandosupo

**Stufita brasiko:** kun malmulte da grasajo kaj daŭra aldono de iom da likvaĵo (akvo, vino) kaj spicoj, malrapide kuirita tranĉita (ruĝa) brasiko. **Abio:** ĉiamverda pingloarbo, ofte uzata kaj ornamita dum Kristnasko.




# El mia kolora vivo



Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak

Kolorigu la suban bildon laŭ la supraj! Nomu la objektojn, beston, arbojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiujn vestojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, besto, arboj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?





José de Jesús Campos Pacheco:

# Balenoj

**Balenoj vere estas mamuloj, ne fiŝoj. Iliaj fluformaj korpoj helpas ilin naĝi tra la akvo, kaj la plata vosto agas kvazaŭ helico por antaŭenpuŝi la balenon.**

**L**a "remiloj" havas formon de naĝiloj, tamen vere temas pri kunpremitaj manoj, enhavantaj ostojn, kiel ĉe la homoj. Ankaŭ kiel la homo la balenoj spiras kaj de tempo al tempo devas alsurfaciĝi, por plenigi la pulmegojn tra la nazo aŭ tra la blovtruo.

Por konservi sin varma, baleno posedas dikajn kovraĵojn el graso, kiu anstataŭas pelton. Balenoj naskas idojn, kaj la balenido nutras sin per la patrino lakto.

La plimulto de la pli grandaj balenoj nomiĝas Bartaj Balenoj. Anstataŭ dentoj ili havas bartojn, kornecajn elastajn lamenojn, kiuj pendas en la buŝo de la supra makzelo, iom simile al kurteno.

La Blua Baleno (*Balaenoptera musculus*, sube maldekstre) povas kreski ĝis la longeco de 33 metroj kaj pezi ĝis 200 tunojn. Ĝi estas la plej granda kaj la plej peza besto sur la tero, en la tuta tera historio. Malgraŭ sia grandeco, ĝi ne estas



karnovora besto, ĝi nutras sin per krilo, planktono de la malvarmaj maroj. Ĝia ido povas havi longecon de 7,50 metroj post naskiĝo kaj pezi 10 tunojn. Post nur du jaroj la idino povas kreski ĝis 15 metroj kaj patriniĝi.

La Gronlanda Baleno (*Balaena mysticetus*, sube dekstre) hejmas en la nordaj maroj, kaj la Ĝibdorsa Baleno (*Megaptera novaeangliae*, sur la supra bildo), kies ventro estas blanka, hejmas en la Antarkta Oceano. Kaj ilin kaj aliajn balenojn oni ĉasas, por akiri la enkorpitan oleon, el kiu oni fabrikas margarinton kaj sapon, sed en multaj landoj estas malpermesate ĉasi tiujn bestojn.

Kion oni povas fari por defendi balenojn kontraŭ ĉasistoj? Kion vi farus, se vi vidus homojn, kiuj damaĝas ilin?







Renée Triolle

# Louise Weiss: pacifisto kaj feministo

Louise Weiss (Luiz' Vajs'), 1893-1983, estis francino, eble ne konata eksterlande, kiu batalis por ke virinoj rajtu voĉdoni. Ŝi “sukcesis” sian politikan karieron nur kiam ŝi estis 86-jara; ŝi elektiĝis ĉe la Eŭropa Parlamento en Strasburgo kaj kiel la plej aĝa deputito ricevis la rajton prezenti la malferman enkondukon de la unuafoje rekte elektita parlamento.

## Ŝia familio

Ŝi naskiĝis en Alzaco, la orienta regiono de Francio, kiu laŭ la bataloj apartenis ĉu al Francio, ĉu al Germanio. Ŝi vivis en bonfarta familio: la patro estis inĝeniero pri minejoj kaj la patrino dommastrino, filino de la fama inĝeniero kaj kuracisto Emile Javal (Emil' Ĵaval'). Etne kaj religie la familio estis diversa: la patro estis alzacano kaj protestanto, la patrino ĉehdevena kaj juda. Ŝi havis kvin gefratojn, du el ili havis brilan karieron.

Kvankam la patro ne subtenis, ke la knabino longe studu, ŝi studis literaturon kaj klasikajn malnovajn lingvojn, kaj estis “agregaciulino” (laŭ la ILEI-sistemo D6-ulino) pri beletro, nur 21-jara. Do ŝi estis verŝajne tre lerta kaj inteligenta studentino. Ankaŭ en Oksfordo, la fame konata brita universitato, ŝi diplomiĝis, sed ŝi preferis ĵurnalismen ol instruadon.



## Pacifisto

En 1914 eksplodis la Unua Mondmilito, kiu senigis Eŭropon de junaj viroj. Ŝi iĝis flegistino (normala tasko por engaĝitaj virinoj), sed tamen ŝi provis kunigi la tiamajn malamikojn, Francion kaj Germanion.

En 1934 ŝi fondis la ĵurnalon *L'Europe Nouvelle* (Nova Eŭropo), kiu ekzistis ĝis junio 1940; ŝi deziris, ke tiu ĵurnalo estu pensiga kaj traktu profundajn sociajn temojn. Ŝi multe vojaĝis tra orienteŭropaj landoj, kaj kunlaboris en pluraj gazetoj. Kun la franca ministro Aristide Briand (Aristid' Brijan') ŝi forte kredis je la potenca kaj necesa rolo de la Socio de Nacioj (la praulo de Unuiĝintaj Nacioj).

Ŝi organizis ciklon de konferencoj, nomatan “Pac-lernejo”.

Jam en 1933 ŝi atentigis pri la danĝera programo de la ĵus elektita Hitlero pri “arjanigo” kaj steriligo\* de kripluloj kaj malsanuloj, dum neniu aparte interesiĝis.

## Feministo

Feminismo estas vorto, kiu rilatas al la bataloj de virinoj, por ke oni donu al ili la rajtojn voĉdoni kaj esti elektitaj. En Britio konata estis tiu movado. Ankaŭ Louise Weiss batalis por tiuj rajtoj en Francio. (Leĝo estis proponita en 1919, por ke virinoj rajtu voĉdoni okaze de lokaj balotoj, sed ĝi estis rifuzita de la senato; en Francio nur en 1945 virinoj ricevis tiun rajton). Ŝi simbole kandidatiĝis en




1935, ricevis 18000 voĉojn en kvartalo de Parizo, uzinte ĉapelon kiel balotilujon. Kun samideaninoj ŝi organizis diversajn agadojn: budojn, reklamilojn, afiŝojn, kunvenojn, disdonon de floroj al deputitoj, ankaŭ de ŝtrumpoj kun aldona frazo “eĉ se ni estos elektitaj, ni plu kudroriparos viajn ŝtrumpojn”. (Hodiaŭ tiu frazo estus vere diskriminacia, ĉar ankaŭ viroj povas ripari siajn ŝtrumpojn!)

Laŭdire ŝi rifuzis ministran postenon, asertante, ke ŝi deziras esti elektita, ne nomumita.

## Pluaj bataloj

Alvenis la Dua Mondmilito en 1939: Louise Weiss baraktis, por ke ankaŭ virinoj servu sian patrolandon, sed politikistoj malkonsentis (en landoj kiel Sovetunio junulinoj kaj virinoj batalis, kiel skribis la nobelpremiitino Svetlana Aleksijevič).



Jam en 1938 ŝi kreis Komitaton por Rifugiintoj, financitan de Rotŝild. En 1940, kiam la ŝtatestro Pétain (Péten') subskribis kun Germanio ĉesigon de la milito, ŝi ne sekvis la Generalon de Gaulle (De Gol') al Londono, kiu invitis francojn plu batali. Laŭ misio de Pétain ŝi kolektis monon en Usono, sed havis surprizon konstati, ke ŝi aperas sur la listo de malaperigitaj judoj! Ŝi intervenis, por ke oni forstreu ŝian nomon el tiu listo (ni scias, kio okazis kun la kompatindaj judoj, deportitaj kaj mortigitaj en koncentroj).

Kiel post la Unua Mondmilito, ŝi multe vojaĝis kaj kreis en 1945 “Instituton pri Kompreno de konfliktoj”, poste en 1971 “Instituton pri Pac-sciencoj” en Strasburgo, en 1971 fondaĵon Louise Weiss por kunlaboro al paco. Ŝi provis, vane, esti elektita ĉe la prestiĝa Franca Akademio (rezervita nur al viroj, dum jarcentoj), same kiel ŝi malsukcesas esti elektita kiel franca deputito.

## Fina kulmino

Post jardekoj da bataloj, en 1979, ŝi estis elektita kiel Eŭropa Deputito ĉe la Eŭropa Parlamento en Strasburgo. Ŝi estis 86-jara! Kiel la plej aĝa deputito ŝi ricevis la honoron malfermi la unuan sesion. Pro ŝia dumviva batalo favore al paco kaj kunlaboro inter la landoj, nova konstruaĵo en la parlamentejo de Strasburgo nomiĝas laŭ ŝia nomo.


Louise Weiss multe baraktis por si mem, sed ŝiaj bataloj kontribuis al novaj atingoj por virinoj, almenaŭ en Eŭropo.

\* **arjano**: antikva tribo, sed laŭ la programo de Hitlero, blondulo kun bluj okuloj, sekve tipa germano. Arjanigo estas programo por malaperigi la aliajn.

\***steriligi**: operacii viron aŭ virinon, por ke ili ne plu kapablu naski.



# Ĉiu mezuras aliajn laŭ sia mezurilo



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**



La tempo pasis, la sezonoj sekvis unu la alian kaj kun la veterŝanĝo kompreneble ankaŭ la Ulidoj ŝanĝis siajn vestaĵojn.

**L**a leĝerajn, somerajn vestaĵojn anstataŭis la pli diketaĵaj aŭtunaj vestaĵoj ofte akompanataj de pluvmantelo. Iom post iom eĉ ili fariĝis nesufiĉaj kaj la Ulidoj retrovis en la fundo de la ŝranko siajn varmegajn vintrajn vestaĵojn, gantojn, botojn, ktp. Ludemulido ĝoje kuris eksteren por povi profiti el la unua neĝo kaj konstrui belan neĝhomon. Iom post iom ĉiuj trovis siajn gantojn kaj komenciĝis konstruad-konkurso.

Komence ĝi estis tre amuza konkurado, sed Kverelemulido komencis.....

– *Mia neĝhomo estas pli bela kaj certe pli granda ol la viaj!* – diris li al la aliaj.

– *Mi pensas, ke ili ĉiuj estas belaj, ja ĉiuj estas unikaj.* – diris Pacemulido.

– *Ne! Tute ne!* – daŭrigis Kverelemulido.

– *Mi havas pli longan brakon ol ekzemple Ulideto, do la mia certeĝo estas pli granda kaj do pli bela!*

Ulideto komencis jam ploreti, sed Pacemulido milde konsolis lin dirante nur tion: – *Ne ĉagreniĝu, Ulideto, li simple havas la ĝiraf-sindromon. Ĉu vi konas ĝin?*

– *La ĝiraf-kion???* – miris Ulideto. – *Rakontu al mi ĝin helpe de Eloïse [’eloiŝ’]!*



**Eloïse Marotte:**  
**La ĝirafo sen longa kolo**



– Hahaha! Ĉu vi vidis ŝin? – Jes! Kia stranga ĝirafo! Ŝi ne havas longan kolon!  
– Eble ŝi eĉ ne estas ĝirafo! – Certe ne! Ŝi estas nur enstrudiĝinto!



– Hontu! Kial vi devas ĉiam moki la aliajn? Eble ŝi estas enstrudiĝinto por vi, sed ankaŭ eblas, ke ŝi kapablas fari aferojn pri kiuj vi nur revas! Foriru, mokuloj!






– Dankon ke vi defendis min!  
Vi estas... ho, ankaŭ vi estas ĝirafa kun mallonga kolo! Ĉu vi volas esti mia amiko? Ĉu vi volas ludi kun mi kaŝludon? Ĉu vi volas, ke mi nombru dum vi kaŝas vin? Ĉu vi...? – Jes, jes! Volonte. Komencu!



Post iom da tempo...  
– Kie ŝi povas esti?  
Ĉu en la suno? Certe ne!  
Ĉu en la aviadilo?  
Mi ne kredas.  
Ho, kiom belas tiu ĉi tipio\*!  
Mi tute ne vidis ĝin antaŭe.



– Ĉu eble ŝi estas en la tipio?  
Estas facile havi la bonan respondon: sufiĉas enrigardi la tipion. Kaj... Amiko! Ĉu vi estas ĉi tie? Ho, venas neniu respondo! Kie ŝi povas esti?



– Ŝi tiom bone kaŝis sin, ke mi komencas dubi, ĉu ŝi vere ekzistas aŭ mi nur sonĝis pri ŝi... Jes! Ŝi ekzistas! Ŝi estas apud la arbo! Hura! Finfine mi trovis vin!



– Estis tre bone ludi kun vi, sed nun mi estas tre laca, mi eĉ marŝi apenaŭ povas. – Jes, ankaŭ mi. Ĉuokaze, ankaŭ la tago finiĝis. Ĝis revido! Ĝis morgaŭ!

Kaj fakte, ne nur la tago finiĝis, sed ankaŭ la jaro 2018...

## Feliĉajn jarfinajn festojn al ĈIUJ!



kaj

## Tre belan novan jaron por 2019!



\*) *indiana tendo.*





Flugado

Mireille Grosjean

# Bertrand Piccard

**Bertrand Piccard estas svisa psikiatro kaj aerostatisto, kiu sukcesis kun la brita piloto Brian Jones, de la 1-a ĝis la 21-a de marto 1999, kiel la unua seninterrompe ĉirkaŭiri la mondon per balono.**

**L**i estas filo de la oceanologo Jacques Piccard, tutmonda rekordulo, kun Don Walsh (1931-) pri submara plonĝado per submarŝipo, kaj nepo de Auguste Piccard, la unua homo, kiu atingis la stratosferon per balono.

Pasie Bertrand flugis per aerbalonoj kaj en diversaj aviadiloj; li sukcesas en tiel nomataj neeblaj defioj. Li kiel la unua flugis ĉirkaŭ la mondo per balono plena je heliumo sen surteriĝi kaj lanĉis la projekton pri sunenergia aviadilo "Solar Impulse", per kiu li konkretigis mondrondiradon en 17 etapoj kune kun plia piloto André Borschberg, sen eĉ unu guto da karburajo.

Kuracisto kaj psikiatro li lertiĝis pri



hipnozo kaj havas grandan intereson pri aziaj filozofioj; pro tio li konsideras plej gravaj la homon kaj la vivkvaliton.

Li elstaras en komunikado kaj pro tio altiras la atenton per sia maniero neniam oponi la ekstrecojn kaj klopodi konstrui pontojn por krei sinergiojn. Per siaj libroj, prelegoj, intervjuoj kaj politikaj renkontoj li klopodas kuraĝigi humanisman vidon, kiu lasas spacon al pionira spirito kaj esploro pri novaj vojoj en la ĉiutaga vivo.

"Se mi revenus el miaj esplorvojaĝoj dirante, ke min tiris nur emo akiri rekordojn, ĉiuj samopinius. Tamen tio ne kongruus kun mi mem. Mi preferas forlasi la lingvajon de la aventuremulo por transdoni aliajn mesaĝojn, tiujn, kiuj gravas por mi."

"Vivo ne konsistas el hazardoj, sed el renkontiĝoj."

For de certecoj kaj de stereotipoj, la esploristo kaj pioniro pli homaranisma ol aventurema, akceptas neniun dogmon krom ĉiudirekta scivolemo. Li diris en intervjuo, ke plej gravas por li transdoni al siaj infanoj tri virtojn: respekto, scivolemo kaj longdaŭra strebado.





Luiza Carol

# La enigmoj de “La Eta Princo”


**Pri “La Eta Princo” de Antoine de Saint-Exupéry, kun desegnaĵoj de la aŭtoro. Elfrancigo de Pierre Delaire, tria reviziita eldono, Kanada Esperanto-Asocio kaj Espéranto-France 2010. 93 paĝoj, 23 cm. Fascina fabela rakonto ne nur por infanoj.**

**L**a libro, kiun mi prezentas al vi nun, estas unu el plej vaste konataj kaj amataj libroj en la tuta mondo.

Tiu rava libro estas plen-plena de enigmoj facilaj aŭ malfacilaj, gravaj aŭ malgravaj, evidentaj aŭ kaŝitaj. Kelkajn enigmojn solvas la aŭtoro mem dum la rakontado. Aliajn vi mem solvos, laŭ via propra vidpunkto. Ankaŭ en la reala vivo okazas la samo: ekzistas enigmoj, kiujn ĉiu homo solvas laŭ sia pensmaniero. Cetere, ne ĉiuj enigmoj de la vivo estas tutece solveblaj, kaj ĝuste tio okazas ankaŭ en la libro. Ni aldonu, ke kelkajn enigmojn oni eĉ ne rimarkas je la unua legado. Je ĉiu nova legado oni malkovras novajn enigmojn kaj oni solvas alimaniere la malnovajn, ĉar intertempe ni mem maturiĝas kaj ŝanĝiĝas.

La enigmo, kiu plej multe kaptis mian atenton, estas la stranga sinteno de la aŭtoro rilate la plenkreskulojn. Ĝis nun ĝi ŝajnas al mi la plej grava aspekto de tiu ĉi libro.

Preskaŭ sur ĉiu paĝo legeblas akraj ironioj kaj kritikoj fare de la aŭtoro rilate la vivmanierojn de la plenkreskuloj kaj eĉ



rilate ties malaltajn komprenkapablojn. Jen unu ekzemplo el la unua ĉapitro:

“La granduloj neniam komprenas ion ajn per si mem, kaj al la infanoj estas lacige ĉiam kaj ĉiam doni al ili klarigojn.”

Tamen, la aŭtoro mem estis plenkreskulo, kiam li verkis la libron! Kiel eblas do, ke li tiom multe malaprezis ĝuste la plenkreskulojn?! Mi multe meditis pri tiu ĉi enigmo, al kiu oni povas doni diversajn respondojn.

Je la unua legado (kiam mi estis 13-jaraĝa) mi supozis, ke la aŭtoro deziris resti infano en sia koro, kaj tial li adoptis vidpunkton de infano, eĉ ne inkluzivante sin mense en la kategorion de “granduloj” (plenkreskuloj). Tiu interpreto ŝajnas al mi ankaŭ nun pravigebla, precipe kiam oni pensas pri la humuraj priskriboj de la strangaj solecaj aliplanedanoj, kiujn la Eta Princo vizitis. Fascinis min tiuj amuzaj portretoj: la reĝo pensanta ke li regas super ĉio, la malmolestulo pensanta ke ĉiuj aliaj homoj devas admiri lin, la ebrulo drinkanta por forgesi ke li hontas drinki, la negocisto pensanta ke li posedas la stelojn







kiujn li kalkulas, la lanternisto pensanta ke li estas devigata lumigi kaj estingi ĉiuminute stratlanternon (nur ĉar oni ordonis al li tion) kaj la geografo pensanta ke li bezonas esploristojn, ĉar “geografo estas tro grava persono por vagadi”.

Pasis la jaroj, kaj nun ĉiuj tiuj karikaturoj protagonistoj pensigas min pri bone konataj plenkreskuloj, kiuj amase ĉirkaŭis min kaj klopodis eduki min tiel, ke mi fariĝu ilia subulo, aŭ admiranto, aŭ kompatanto, aŭ esploristo... Ankaŭ la negocisto kaj la tro obeema lanternisto similas al plenkreskaj konatuloj, prezentintaj al mi vivstilojn, kiujn mi ne deziris imiti. La lanterniston mi tamen estimis, kvankam mi ne estus dezirinta pasigi tro da tempo kun li. Kaj kvazaŭ divenante miajn sentojn, la Eta Princo diras pri la lanternisto: “Povas esti, ke tiu viro estas absurda. Tamen li estas malpli absurda, ol la reĝo, la malmolestulo, la negocisto kaj la ebrulo. Almenaŭ lia laboro havas sencon. Kiam li lumigas sian lanternon, estas kvazaŭ li aperigus unu plian stelon, aŭ floron. Kiam li estingas sian lanternon, tio endormigas la stelon aŭ la floron. Jen bela okupo. Tio vere utilas, ĝuste ĉar tio belas. [...] Tamen li estas la sola, kiu ne ŝajnas al mi ridinda. Eble, ĉar li okupiĝas pri io alia, ol pri si mem. [...] Tiu estas la sola, kun kiu mi povus amikiĝi. Sed lia planedo estas vere tro malgranda. Sur ĝi ne estas spaco por du personoj...”

Mi sendube preferis kaj daŭre preferas kiel modelon la vivstilon de la aviadisto, kiu fakte estas la aŭtoro mem, kapabla kompreni la dezirojn de la infanoj, admirati ĉiujn belecojn de la tero kaj ĝui ankaŭ la solecan meditado en la dezerto...

Relegante la libron post pluraj jaroj, mi ekpensis, ke la aŭtoro ne aludas al ĉiuj plenkreskuloj, kiam li faras siajn akrajn asertojn pri “granduloj”. Treege verŝajnas, laŭ mi, ke li aludas nur al tiuj plenkreskuloj, kiuj perdis la sincerecon, la spontanecon kaj la imagpovon de sia infanaĝo. Unu el la pruvoj pri tio estas la sekva amuza

kaj interesa fragmento: “La Tero ne estas ajna planedo! Oni nombras sur ĝi cent dek unu reĝojn (sen forgesi la negrajn, kompreneble), sep mil geografojn, naŭcent mil negocistojn, sep milionojn kvincent mil ebrulojn, tricent dek unu milionojn da malmolestuloj, sume ĉirkaŭ du miliardojn da granduloj.”

Mi ne faris esplorojn pri kiom da plenkreskuloj fakte vivis sur la tero en la jaro 1943, kiam la libro estis verkita. La nombro de du miliardoj povus esti pli-malpli akurata. Sed oni certe ne povas kalkuli kiom da homoj sentas sin anime samkiel la reĝo, la malmolestulo, la negocisto ktp. Tiu humura statistiko estas evidente ŝerco. Sed ĝuste pro tio, ke ĝi ŝajnis al mi ege amuza ŝerco, mi legis ĝin ree kaj ree kaj tial malkovris kaŝitan enigmon ene de ĝi. Se vi provos adicii ĉiujn ciferojn de la supra imaga statistiko, vi vidos, ke mankas pli ol unu kaj duona miliardo da homoj ĝis la sumo de du miliardoj. En kiujn kategoriojn inkluzivis la aŭtoro la plejmulton de la plenkreskuloj? Eble ĝuste en tiujn kategoriojn, kiuj ne meritas primokadon? Se jes, tio signifus, ke la aŭtoro ne vere volis primoki ĉiujn plenkreskulojn. Ĉu? Kion vi opinias?

Post kelka tempo, okaze de nova legado de tiu libro, mi komencis demandi min, ĉu la aŭtoro ironias nur la plenkreskulojn. Certe la aŭtoro ne vere primokas akre la infanojn, sed laŭ mi, foj-foje li ŝanĝas sian perspektivon kaj iom aludas (tre ame kaj milde) ankaŭ al la ĉarma, sed iom ridetinda naiveco de la infan... Dum la unuaj legadoj mi ne rimarkis tion. Sed poste, subite, mi estis ŝokita malkovri kelkajn pruvojn pri tia sinteno. La plej evidenta aperas ekde la komenco. Sur la unua paĝo aperas kopio de la unua desegnaĵo de la aŭtoro, farita kiam li estis sesjara. Jen ĝi:





Se vi jam legis la libron unu fojon, vi verŝajne rememoras kion la desegnaĵo prezentas, ĉar tiu ĉi estas unu el la facilaj kaj etaj enigmoj, kiujn la aŭtoro mem solvas en la teksto. Cetere, antaŭ ol prezenti al la legantoj la desegnaĵon, la aŭtoro zorgas doni informojn pri la libro kiu influis lian kreemon tiam, kaj eĉ prezenti iun desegnaĵon, kiu estis aperinta en la koncerna libro kaj inspiris lin por fari sian propran artaĵon. La leganto, kiu jam estas tiom bone preparita, ja povas eventuale diveni, kion la sesjara desegnisto celis ilustrati. Mi ne plu rememoras, ĉu mi divenis tion je la unua legado, sed povus esti ke jes. Sed mi supozas ke neniu (sendepende de sia aĝo) povus diveni la intencon de la juna desegnisto, sen ricevi kelkajn klarigojn. Mi jam esploris tiun aferon. Antaŭ longe mi demandis tutan klason da sesjaraj infanoj, kion signifas la desegnaĵo. Kelkaj el ili vidis ĉokoladan glaciaĵon fandiĝantan, aliaj vidis ĉapelon, aliaj vidis monteton, aliaj vidis rokon... Neniu el tiuj respondoj estas la ĝusta.



En la libro la infano ege seniluziiĝis pri la malalta komprenkapablo de la plenkreskuloj, kiuj ne solvis tiun enigmon. Sed nun mi demandas min: kiam la aŭtoro asertas tute ferme, ke plenkreskuloj “neniam komprenas ion ajn per si mem”... ĉu li ne primoketas iomete la infanon, kiu li mem estis, tiun infanon kiu, pro manko de vivosperto, ne kapablis ankoraŭ kompreni, ke ĉiuj personoj (inkluzive de infanoj) bezonus kelkajn klarigojn por eventuale solvi tian enigmon...? Kion vi opinias pri tio?

Saint-Exupéry, la aŭtoro de tiu fascina libro, dediĉis ĝin al sia plej bona amiko, la franca verkisto Léon Werth. Tiu relative longa dediĉo estas bela kaj divers-flanke signifa, sed mi pridiskutos nur unu el ĝiaj aspektoj. La aŭtoro diras: “Pardonu infanoj,

ke mi dediĉis ĉi tiun libron al plenkreskulo – al ‘grandulo.’” Sekvas kelkaj gravaj kaj interesaj senkulpigaj (kiujn vi malkovros dum la legado), kaj poste li aldonas:

“Se ĉiuj tiuj senkulpigaj ne sufiĉas, mi volonte dediĉos ĉi libron al la infano, kiu iam antaŭe tiu grandulo estis. Ĉiuj granduloj unue estis infanoj. (Sed malmultaj el ili memoras pri tio.) Mi do korektas mian dediĉon: al Léon Werth, kiam li estis malgranda knabo.”

Jen interesa sinteno de la aŭtoro rilate sian amikon: li vidas lin samtempe kiel plenkreskulon kaj kiel infanon, kaj dediĉas la libron al la infano, kiu lia amiko estis iam, kvazaŭ uzante tempo-tunelon por renkonti tiun. Ni povas demandi nin: ĉu la aŭtoro ne uzis la saman metodon por prezenti la du protagonistojn de la libro?

Saint-Exupéry estis aviadisto, samkiel la plenkreska protagonisto. Li travivis aviadilakcidenton en la dezerto Saharo kaj pasigis kelkajn terurajn tagojn tie, samkiel la protagonisto. Tio signifas, ke la libro entenas tre multajn aspektojn el la reala vivo de la aŭtoro. Pro tio oni povas eventuale imagi, ke la dialogo inter la aviadisto kaj la Eta Princo estus iusence imaga dialogo inter la plenkreska aŭtoro kaj la infano, kiu li mem estis. Alivorte, la du protagonistoj povus esti unu sola, kiu parolas kun li mem tra tempo-tunelo en la soleco de la dezerto. Tio klarigus kial la aviadisto kaj la Princo ofte divenas reciproke siajn pensojn...

Mi kundividis kun vi nur kelkajn el miaj ideoj pri la sinteno de la aŭtoro, koncerne la vidpunktojn de la infanoj rilate al plenkreskuloj kaj ankaŭ ties vidpunktojn rilate al infanoj. Sed kiam vi legos la libron, vi malkovros en ĝi multajn aliajn aspektojn kun same multaj enigmoj, kiuj pensigos kaj emociigos vin. Jen libro pri kiu indas mediti foj-foje dum la tuta vivo.





# *Juna Amiko* en instruado

## Enketo pri uzo de la revuo en instruado de Esperanto, septembro 2018

Tiu ĉi enketo estas adresata al Esperanto-instruistoj tra la tuta mondo kaj celas esplori pri utilo de la revua enhavo en instruado kaj lernado de Esperanto. Bv. skribi la respondon apud la demando aŭ simple substreki la taŭgan varianton.

### I. Personaj informoj pri la instruisto

1. Kiom da jaroj vi instruas Esperanton?
  2. Ĉu vi estas profesia lingvo-instruisto?
  3. Ĉu vi estas profesia pedagogo?
  4. Al kiu aĝgrupo vi instruas Esperanton:
    - a) Etuloj – infanoj antaŭ lernejo?
    - b) Lernejoj de bazaj lernejoj (6-11-jaraj)?
    - c) Lernejoj de mezaj lernejoj (11-18-jaraj)?
    - d) Studentoj de altaj lernejoj (universitatnivelaĵ)?
    - e) Plenkreskuloj?
    - f) Al personoj de la tria aĝo?
  5. Laŭ kiu metodo vi instruas Esperanton?
  6. Kiujn lernolibrojn vi uzas en via instruado?
- ### II. Ĉu vi abonas JA-n? Se jes, kiom da personoj legas vian revuon?
- ### III. Ĉu vi uzas materialojn de JA en via instruado?

### IV. Se jes, bv. indiki, kiujn rubrikojn el la konstantaj vi uzas:

- Konversaciaj temoj;
- LUME;
- LUDE;
- Nature;
- Legu kaj ĝuu;
- Ekkonu mian landon;
- Kantu kun JA;
- Interkultura mondo;
- Bildstrioj;
- LASTE;
- Diversaj rakontoj, legendaĵoj;
- Desegnaĵoj;
- Enigmoj.



### V. Kiamaniere vi uzas JA-n dum via instruado:

1. Vi uzas ĝin dum viaj lecionoj:
  - vi legas tekstojn el JA por aŭdado kaj kompreno;
  - viaj lernantoj legas tekstojn el JA;
  - viaj lernantoj kantas kantojn;





- viaj lernantoj solvas enigmojn kaj aliajn taskojn el JA;
- viaj lernantoj uzas bildojn el JA por kompili tekstojn, demandojn k.a.;
- alimaniere (*se vi klarigos, tiu informo estos tre utila por la redakcio*).

2. Viaj lernantoj uzas JA-n hejme, preparante diversajn hejmtaskojn;

- legas tekstojn;
- lernas kantojn;
- solvas enigmojn kaj aliajn taskojn el JA;
- uzas bildojn el JA por kompili tekstojn, demandojn k.a.
- alimaniere (*se vi klarigos, tiu informo estos tre utila por la redakcio*).

VI. Ĉu viaj lernantoj komencas aboni JA-n dum kaj post la lernado de Esperanto?

VII. Se jes, proksimume kiom da viaj lernantoj komencas aboni JA-n:

- neniu;
- malpli ol 25 %;
- 25-50 %;
- 50-75 %;
- 75-100 %.



VIII. Kio plaĉas al vi en JA rilate al instruado de Esperanto?

- tekstoj kun interesaj kaj pozitivaj informoj ĝeneralaj pri la mondo

- Konversaciaj temoj
- ludoj, kvizoj
- alio (*se vi klarigos, tiu informo estos tre utila por la redakcio*).

IX. Kio mankas en JA por instruado, laŭ via opinio:

- metodikaj materialoj;
- lingvo-ekzercoj;
- lingvo-taskoj;
- ludoj;
- informoj pri Esperanto kaj Esperantujo;
- io alia (*se vi klarigos, tiu informo estos tre utila por la redakcio*).

X. Ĉu vi ŝatus, ke aperu apud la tekstoj indiko pri **nivelo de lingvaĵo**: 1 – por facilaj tekstoj, 2 – por mezfacilaj tekstoj, 3 – por tekstoj en pli alta lingvonivelo? JES/NE

La redakcio de JA kaj la Estraro de ILEI esprimas koran dankon al vi pro la helpo en evoluigo de nia kara *Juna Amiko*! Bonvole sendu viajn respondojn al Elena Nadikova, [ilei.sekretario@gmail.com](mailto:ilei.sekretario@gmail.com).

Tiu ĉi enketilo elŝuteblas en pdf-formato ĉe: [http://www.ilei.info/novajxoj/JunaAmiko4\\_2018.enketo.pdf](http://www.ilei.info/novajxoj/JunaAmiko4_2018.enketo.pdf)



# Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## Kristnasko kun libro

**Baldaŭ estos fino de la jaro kaj vi certe jam serĉas kristnaskajn donacojn por viaj familianoj aŭ geamikoj. Mi do, kiel kutime, instigas vin donaci librojn. Kompreneble belega donaco estus libro en la lingvo Esperanto.**

**T**amen mi scias, ke ĝin vi povas donaci nur al esperantistoj, aŭ al tiuj, kiuj intencas lerni Esperanton...

**Kial donaci libron? Jen kelkaj kialoj:**

1. Ĉiun libron vi povas legi multfoje kaj ĉiam trovi ion, kio estos interesa por vi.
2. La libro kostas malpli ol parfumoj, vestaĵoj, juvelaĵoj ...
3. La libron vi povas kunporti ĉiuloke (ĝi ne bezonas bileton).
4. Ĉiam vi trovos konvenan libron por ĉiu.
5. Dank' al la libro vi povas renkontiĝi kun iu, kiun vi volas, aŭ kun iu

dezirata, ekz. kun sciencisto, milionulo, filozofo aŭ herooj de fabeloj...

6. La libron povas uzi multaj personoj kaj ĝia teksto ne perdas sian valoron.
7. "Kiu legas, tiu vivas duoble" – diris Umberto Eco kaj do donaci libron estas tiel, kiel donaci vivon.
8. La libroj estas plej bonaj amikoj!



**Legu, legu, legu!**

## Klubo de bona libro

**L**a Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.



## Rekomendo

**P**or la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas la infanlibron “La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”, kiun eldonis Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP). Tiu libro estis premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA dum la ĉi-jara UK en Lisbono. La aŭtoro, José Mauro Progiante, estas brazilano, esperantisto kaj instruisto de la lingvo Esperanto. La ilustraĵojn preparis brazila desegnistino Mariana Hortolani Rodrigues.

Kvin infanoj, Andreo, Mavomo, Hua, Roza kaj Eriko estas la ĉefroluloj de la libro “La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”. Ili devenas el malsamaj kontinentoj kaj renkontiĝas en Brazilo okaze de kongreso de la internacia lingvo. Pere de la internacia lingvo ili amikiĝas. Ili preterville implikiĝas en aventuron, kiu komenciĝis antaŭ jarcentoj, kiam du totemoj estis ŝtelitaj el indiĝena tribo kaj el tio naskiĝis terura malbeno. Dum semajno de la kongreso la kvin geamikoj kune alfrontas la malbenon ligitan al la totemoj, por solvi enigmon.

Mi sukcesis intervjui la aŭtoron de la rekomendita libro, José Mauro Progiante:

**Ricevi la premion en la Belartaj Konkursoj de UEA estas belega distingo. Mi kore gratulas! Kion vi sentis kiam vi eksciis, ke vi ricevis tiel gravan premion?**

Kompreneble mi sentis egan ĝojon, ĉar la juĝkomisionoj de la konkurso estas tre rigoraj. Kaj mi sentis ankaŭ koran dankemon, kion mi volas esprimi ĉi tie, al du homoj, membroj de la estraro de la eldonejo EASP-Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: José



Roberto Tenório, kiu stimulis min publikigi la verkon en Esperanto kaj sendis ĝin al la konkurso; kaj Paulo Sérgio Viana, kiu faris la revizion de la teksto.

**Bonvolu mallonge prezenti vin al niaj legantoj.**

Mi estas brazilano, 57-jara, esperantisto ekde 1983.

Mi loĝas en la urbo Bauru,

Brazilo, kie mi aktivas kiel estrarano kaj instruisto de Esperanto en la loka grupo Esperanto-Societo de Bauru. Mi verkas en la portugala lingvo kaj ankaŭ en Esperanto, ĉefe kunlaborante en la revuo “La Lampiro”, eldonata de EASP-Esperanto-Asocio de San-Paŭlo.

Mi havas tri gefilojn – Ana Lia, Sara Helena kaj André – nuntempe jam plenkreskuloj. Kiam ili estis infanoj, preskaŭ ĉiunokte mi rakontis al ili historiojn, kelkfoje kreitajn de mi mem. Unu el tiuj rakontoj temis pri infanoj de pluraj landoj, kiuj renkontiĝis en brazila urbo por partopreni en kongreso de la internacia lingvo kaj travivis strangan aventuron. Dum la semajno de la kongreso ili bezonis solvi enigmon pri du totemoj, ŝtelitaj de indiĝena tribo. Ĉar miaj gefiloj ŝategis tiun rakonton, mi decidis skribi kaj konigi ĝin al ĉiuj. Tiel naskiĝis la libro, originale en la portugala lingvo, kun la titolo “A Maldição de Taruma e Nurana”. Poste mi mem esperantigis la tekston, kiu estis reviziita de Paulo Sérgio Viana, brazila esperantisto, verkisto kaj tradukisto, multfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA.

**Dankon! Ni do jam scias kiumaniere naskiĝis la libro, kiu ricevis premion en la branĉo “Infanlibro de la Jaro” en la Belarta Konkurso de**







## UEA. Ĉu tiu rekomendita libro estas via unua, aŭ vi jam skribis aliajn?

“La Malbeno de Tarumo kaj Nurana” estas mia unua publikigita libro. Mi jam skribis alian rakonton pri nova aventuro de la samaj roluloj en alia lando, kie ili renkontiĝos denove en internacia kongreso. Mi intencas lanĉi ĝin en la portugala lingvo en la komenco de la venonta jaro kaj ankaŭ en Esperanto, kiel eble plej baldaŭ. Mi preparas ankaŭ eldonon de pli eta infanlibro, en kiu mi rakontas alian fabelon, kreitan de mi por miaj gefiloj, pri aligato, kies vosto senĉese kreskis.

Krome mi verkas por plenkreskuloj. Baldaŭ (ankoraŭ ĉi-jare) estos lanĉita mia unua eldonaĵo, Abdo Fariz e outras lembranças (Abdo Fariz kaj aliaj memoraĵoj), en la portugala lingvo.

## Kion pensas nun viaj infanoj, legante la libron kun “siaj” fabeloj?

Miaj “infanoj” Ana, Sara kaj André nun estas 33-31-27-jaraĝaj. Ili kreskis, edz(in)-iĝis, finance sendependiĝis, sed neniam forgesis (almenaŭ tion ili diras al mi) tiun tempon, kiam mi rakontis fabelojn al ili. Danke al tio, ke en nia domo estis multaj libroj, ili al kutimiĝis al legado kaj nuntempe eĉ kapablas kritike legi miajn tekstojn. Ili instigas min rememori kaj publikigi tiujn antikvajn rakontojn, por ke aliaj infanoj ĝuu ilin.

Ĉar mia filino Ana estas graveda, mi, kiu unuafoje estos avo, senpacience atendas la momenton, en kiu mi regalos mian nep(in)on per emociaj fabeloj.

## Kiu aŭtoro estas via ŝatata?

Mi ŝategas du klasikulojn, kies verkojn mi konstante legas: Viktoro Hugo kaj Fjodor Dostojevskij. Pablo Neruda estas mia preferata poeto. Trevor Steele estas mia opinie la plej elstara Esperanta verkisto.

## Kiun libron vi la pleje ŝatas?

“La Mizeruloj”, de Viktoro Hugo, estas mia plej ŝatata libro. Unu el la plej grandaj aventuroj de mia vivo, kiam mi estis infano, estis la unua legado de tiu libro. Mi estis 11-jaraĝa kaj la libro havis pli ol mil paĝojn. Tiam mi plenigis tutan kajeron per la nekonataj vortoj. Samtempe mi ĝuis neforgeseblajn travivaĵojn kaj riĉigis mian vortostokon.

## Ĉu estante infano vi aŭskultis fabelojn kaj kiu ilin al vi rakontis?

Ne, kiam mi estis infano, mi ne aŭskultis fabelojn. Miaj gepatroj estis bonegaj homoj, tamen bedaŭrinde tre malriĉaj kaj neinstruitaj. Feliĉe mi studis en lernejo kun bonaj instruistoj kaj en mia urbo estis publika biblioteko, kiun mi vizitadis ĉiusemajne por prunti librojn. Tie mi eniris la fascinan mondon de la literaturo kaj malkovris la plej belajn fabelojn. Mi do mem “rakontis” al mi fabelojn.

## Kiu fabelo estis la plej ŝatata?

Estas malfacile elekti nur unu, ĉar mi ŝatis multajn. Mi memoras bone, ke kiam mi trovis en la biblioteko la bildrakontojn de Tinĉjo, mi rapide legis ĉiujn liajn aventurojn kaj mi revis vojaĝi tra la mondo kiel li. Similan senton mi havis legante la infanlibrojn de brazila verkisto, Monteiro Lobato, ĉefe la volumojn en kiuj infanoj vojaĝas tra la tempo kaj akompanas la grekan heroon Heraklon dum liaj 12 laboroj.

## Kiun verkist(in)on vi volus renkonti kaj interparoli kun li (ŝi)?

Kiel esperantisto mi volus rekonti kaj interparoli kun nia kara majstro Zamenhof.

**Vi menciis Ludovikon Zamenhof kaj do ni interparolu iomete pri Esperanto. Kial vi komencis lerni Esperanton? Ĉu ĝi ŝanĝis vian vivon?**

Mi estis junulo tre scivolema. Unu fojon, en la fora jaro 1983, kiam mi estis en



librofoiro, mi vidis dulingvan libreton, kies nomo allogis min: “Homeopatio kaj Spiritismo”. Mi tuj komprenis la du ĉefajn vortojn de la titolo, ĉar mi sciis, kio estis homeopatio kaj ankaŭ kio estis spiritismo. Stranga por mi estis tiu vorteto “kaj”. Tiam mi estis akompanata de amikino, kiu vidis mian intereson kaj klarigis al mi, ke temis pri universala lingvo, nomata Esperanto. Mi memoras, ke senpripense mi diris al ŝi: Ha, interesa afero, iam mi lernos tiun lingvon. Post nur kelkaj tagoj, hazarde mi vidis anoncon pri kurso de Esperanto, komenciĝonta en Spiritisma Domo de mia urbo. Denove senpripense mi aliĝis al la kurso, en kiu mi lernis Esperanton rapide, ĉar la instruisto estis S-ro Ivon Barbosa, unu el la plej elstaraj kaj parolflujaj brazilaj esperantistoj.

Jes, Esperanto iel ŝanĝis mian vivon, ĉar per ĝi mi komencis interrilati kun homoj el la tuta mondo, kio ne estis kutima afero en mia lando, en tiu antaŭinterreta epoko.

**Ankaŭ mia vivo ŝanĝiĝis dank’ al Esperanto kaj tial mi ĉiam estas scivola, ĉu ĝi ankaŭ influas vivon de aliaj personoj. Kio, laŭ via opinio, devus esti la plej grava atuto de internacia lingvo?**

Krom Esperanto, dum mia vivo mi studis kaj ankoraŭ studas aliajn lingvojn, kaj mi uzas mian propran sperton por argumenti, ke ili ĉiuj estas egale riĉaj kaj ke la avantaĝo de Esperanto kuŝas en la gajno pri temp- kaj moninvesto necesaj por ĝia lernado.

**Kia estas via vivmoto (maksimo)?**

Mi intencas ĉiam lerni novajn aferojn, kaj do mi kredas, ke bone esprimas mian celon ĉi tiu maksimo: Por sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno.

**Kiuj estas viaj fortaj kaj malfortaj flankoj?**

Malfacila demando. Mi pensas, ke mi estas modere ordema kaj disciplinema, kaj ke tiuj ecoj estas nuntempe tre utilaj,

pro la amaso da disponeblaj informoj kaj allogaĵoj. Pri miaj malfortaj flankoj mi povus diri multe, sed tamen unu el ili estas iom da pigreco; do mi citos nur kelkajn (rido). Mi tute ne scias desegni, kanti, danci kaj mi estas submeza en ĉiuj sportoj, kiujn mi ludas.

**Kiumaniere vi pasigas liberan tempon? Kio estas via hobbio?**

Dum la ferioj (unu monato jare) mi vojaĝas, por simple turismi aŭ partopreni en Esperantaj eventoj (ĉi-jare mi ĉeestis la Universalan Kongreson en Lisbono). En la normalaj tagoj kaj semajnfine mi profitas la liberan tempon ĉefe por interrilati kun miaj familianoj, legi, verki kaj sportumi (kuri kaj tenisi). Pure plezuriga hobbio por mi estas krucvortoj.

**Kion vi deziris fariĝi estinte malgranda knabo?**

Mi volis esti kaj sciencisto kaj astronauto. Do mi tute deflankiĝis.

**Finante bonvolu respondi sekvan demandon: Kio estas por vi amikeco?**

Malfacilega demando. PIV ne helpis min, ĉar ĝi seke diras, ke amikeco estas sentoj de amiko. Por mi amikeco estas aparta speco de amo, ne la plej intensa, tamen la plej serena kaj sereniga.

**Koran dankon pro viaj sinceraj respondoj. Ĉu vi respondus demandojn de niaj legantoj?**

Ankaŭ mi kore dankas kaj kun plezuro respondos demandojn de la legantoj de *Juna Amiko*.

**Karaj legantoj de *Juna Amiko*, vi havas nekutiman eblecon sendi demandojn al José Mauro Progiante, la aŭtoro de la bela infanlibro “La Malbeno de Tarumo kaj Nurana”, kiu ĉi-jare estis premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA (vidu [https://eo.wikipedia.org/wiki/Belartaj\\_Konkursoj\\_de\\_UEA](https://eo.wikipedia.org/wiki/Belartaj_Konkursoj_de_UEA)).**





# Ekkonu legendon kaj provu rekoni landon

Konkurso ne nur por junaj legantoj



**Ĉi-foje mi havas surprizon. Baldaŭ estos fino de la jaro kaj certe tiujn, kiuj estis ĝentilaj, vizitos la Sankta Nikolao. Tial mi proponas al vi ekkoni unue legendon pri la grava kaj konata persono de bela kaj sorĉa lando – kaj poste respondi al si mem pri kiu lando temas. Mi certas, ke vi rapide trovos ĝustan respondon.**

**L**a legendon pri Sankta Nikolao sendis Maria Eszes, la prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, la prezidanto de Arta Rondo kaj manaĝerino de la FÓNIX-ĉambrokoruso. Ŝi ŝatas pentri, verki poemojn, prozojn kaj kanti en koruso. Fine de la rubriko vi povos admiri la bildon de Maria Eszes “Leviĝanta Suno en Istanbulo”, kiun ŝi pentris post tralego de informoj pri Anatolio, kiujn mi kune kun Vasil Kadifeli preparis por la pasinta numero de *Juna Amiko*.

## Legendo pri la Sankta Nikolao

**L**i naskiĝis post Kristo ĉirkaŭ la jaro 245 en Anatolio – en Malgranda Azio. Jam en lia infanaĝo okazis kelkaj mirakloj. Li vivis en monaĥejo, kie li ekŝatis la monaĥejan vivon, kaj tiel li elektis la vivdestinon de pastro.

Li dediĉis sian tutan vivon al helpo de la homaro kaj al la infanoj. Se iu petis lin, li ĉiam helpis. Pri lia homamo oni jam aŭdis en malproksimaj landoj, kaj la homoj komencis preĝi al li. Li fariĝis protektanta sanktulo de la maristoj pro la okazaĵoj dum la pilgrimado al Jerusalemo.

Li aliris por preĝi al la ĉefurbo de Anatolio (Myra) revene de sia pilgrimado, kie lin oni elektis episkopo inter legendaj cirkonstancoj.

Li estis episkopo dum 52 jaroj. Oni lin ekamis pro lia zorgo pri la infanoj kaj la homoj. Li disdonis sian havaĵon por helpi la infanojn kaj la homojn.

Li vivis kiel simpla homo inter la popoloj. Dume li instruis kaj anoncis la amon.

Li promenadis ĉiuvespere sur la stratoj, paroladis kun la homoj kaj li atentis pri iliaj zorgoj. Tiel okazis lia legenda okazo, kiu estis realaĵo:

Najbare de la monaĥejo vivis malriĉiĝinta nobela homo, kiu kripliĝis kaj tiel li ne havis manĝaĵon. Li havis 3 filinojn, kiuj estis antaŭ la edziniĝo. Ili paroladis: unu el ili vendu sin kiel sklavon, kaj povu helpi sian familion, kaj la aliaj fratinoj povu edziniĝi.

Tiam alvenis sub iliaj fenestroj la episkopo Nikolao, kaj li aŭdis la paroladon. Li metis manplendon da oro en tukon, kaj li ĵetis ĝin tra la fenestro en la ĉambron. La knabinoj kredis, ke miraklo okazis. Post unu jaro en la sama tago okazis la samo, kaj li ĵetis la oron por la dua knabino. Ili aŭdis ian voĉon kaj ies paŝojn. Ili eliris el la ĉambro kaj ili vidis iun homon en ruĝa vestaĵo, kaj li rapide foriris en la malhelo. La tempo pasis. En la tria jaro, kiam li vizitis la domon de la knabinoj, li trovis la





fenestron fermita, ĉar la vetero estis tro malvarma. Tiam li surgrimpis la domon, kaj enĵetis la oron tra la fumtubo. La plej juna knabino samtempe metis sian ŝtrumpon en la fornelon por sekigi ĝin, kaj la oro tuj falis en tiun ŝtrumpon.


Oni pensis pri la nekonata bonfarinta homo, ke la okazaĵo estas miraklo, kaj tiu homo vivas en la montaro Taurus, kie kutime estas granda neĝo. Tial oni nomis lin Vintro-paĉjo, kiu mem alvenas kaj portas donacojn. Post iom da tempo la sekreto solviĝis, ke la bonfarinto estas la episkopo Nikolao mem. De tiu tempo antaŭ lia nomfesto vespere la 5-an de decembro li donacis ĉiuspecajn dolĉaĵojn al la infanoj. Pro lia agado oni nomis lin “Noel-Baba”, tio estas “la donacanta patro”.

Li havis longan vivon, pacan maljunaĝon. Laŭ la legendo anĝeloj portis lian animon al lia fina ripozejo (la 6-an de decembro en la jaro 342). De tie fontas pura akvo. Li sendas la mesaĝon de la supermezura amo el ĉi tiu pura fonto al la nunaj infanoj pere de sia posteulo, la legenda Nikolao.

Mi finas la rubrikon per bela poeziaĵo de Halina Kuropatnicka-Salamon, dezirante al vi la samajn fabelajn tagojn. Ĝis la revido en la nova jaro 2019!

## Brilaĵo

*Ni elrevos festabieton,  
tian freŝan, aroman, verdantan,  
tutan inter briletoj starantan,  
plej ĉarmegan propran festarbeton.  
Sur fleksebla ĉiu branĉeto  
ni pendigos miraklan revaron,  
belmomentojn, ridetojn, sonĝaron  
– sur fleksebla ĉiu branĉeto.  
Kaj sur arbetpinto, plej alte,  
stelo de plenumiĝoj atendos;  
bondezirojn ni ĉiujn forsendos  
al la stel' arĝenta, plej alten.*





# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie...  
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi  
helpas vidi kaj krei alimaniere  
la mondon, permesas revii, aŭ  
transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi denove prezentas kanton de Luiza Carol el Israelo, longdaŭra kunlaborantino de *Juna Amiko*. Ĉi-foje elektita kanto nomiĝas *Lulkanto por galanto*. Fine de la rubriko vi ekscios kial tiu bela floro, galanto, estas heroo de la kanto.



## *Lulkanto por galanto*

*Dormu kara beb-galanto,  
dormu dum la venta kanto.  
Dormu sub la neĝ-kovrilo,  
dormu en glaci-lulilo.  
Dormu beb' de vent' vartita,  
beb' kun verda ĉapo pinta,  
bebo kun petal-suĉilo,  
bebo kun foli-mantilo\*.*

*Nokta frost' kun aĉa dento,  
Rampas kiel fi-serpento,  
volus ĝi vin aĉe mordi,  
volus ĝi vin aĉe tordi.  
Kaŝu vin sub neĝ-kovrilo,  
sidu en glaci-lulilo.  
Frumatene varmo venos,  
tuj la froston sun' forpelos.*

*Beb' kun ĉapo pinta punta,  
venas la printempo bunta,  
venas ĝi kun sun-radioj,  
venas ĝi kun gajaj krioj.  
Dormu beb' de vent' vartita,  
beb' kun verda ĉapo pinta,  
bebo kun petal-suĉilo,  
bebo kun foli-mantilo.*

Mi demandis Luizan pri genezo de tiu kanto. Jen ŝia respondo:

Galanto estas delikata floro, kiu aperas en Rumanio fine de vintro kaj ŝajnas anonci la proksimiĝon de printempo. Dum miaj infaneco kaj juneco ĝi havis por mi apartan signifon: ĝi anoncis ankaŭ la proksimiĝon de mia naskiĝtago kaj ŝajnis beni min okaze de ĝi, kiam oni donacis ĝin al mi kune kun bondezir-vortoj.

\* ) *Mantilo*: larĝa tuko por kapo kaj ŝultroj.



# Lulkanto por galanto

Vortoj kaj melodio: Luiza Carol

Am E Am E Am

dor-mu ka - ra beb - ga - lan - to dor - mu dum la ven - ta kan - to  
nok - ta frost' kun a - ĉa den - to ram - pas ki - el fi - ser - pen - to  
beb' kun ĉa - po pin - ta pun - ta ve - nas la prin - tem - po bun - ta

5 Dm E7 Am C+

dor - mu sub la neĝ - ko - vri - lo dor - mu en gla - ci lu - li - lo dor - mu beb' de vent' var -  
vo - lus ĝi vin a - ĉe mor - di vo - lus ĝi vin a - ĉe tor - di ka - ŝu vin sub neĝ - ko  
ve - nas ĝi kun sun - ra - di - oj ve - nas ĝi kun gaj - aj kri - oj dor - mu beb' de vent' var -

10 Dm E7 Am

ti - ta beb' kun ver - da ĉa - po pin - ta be - bo kun pe - tal - su - ĉi - lo  
vri - lo si - du en gla - ci - lu - li - lo fru - ma - te - ne var - mo ve - nos  
ti - ta beb' kun ver - da ĉa - po pin - ta be - bo kun pe - tal - su - ĉi - lo

15 E7 Am (3)

be - bo kun fo - li - man - ti - lo  
tuj la fros - ton sun' for - pe - los  
be - bo kun fo - li man - ti - lo

Nun mi loĝas apud la bordo de la Mediterana maro kaj ĉi tie la klimato maltaŭgas por galantoj. Sed mi nostalgias pri galantoj samkiel mi nostalgias pri la infano kiu mi estis.

Mi volus ke la tempo ne forviŝu la signifajn momentojn de miaj iamaj printempoj. Tiuj momentoj reaperas en mia menso kaj defias forgeson, samkiel galantoj defias la froston.



## Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo!

La melodio en mp3-formato elŝuteblas ĉe: <https://tinyurl.com/y9kxutpa>





Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
Esperanto-klubo "Betuleto"  
Lernejo/Ŝkola 56,  
pr. Traktoroŝtrotelejo, 38  
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio  
[lena\\_espero@mail.ru](mailto:lena_espero@mail.ru)



# La Lundoj de la Vortoj

## Saluton, karaj legantoj!

Pasinta somero, kiel kutime, estis plena je diversaj eventoj. En la antaŭa numero ni rakontis pri du kongresoj en Hispanio. Ili estis tre sukcesaj kaj fruktodonaj.


Ĉi-numere ni rakontos al vi pri alia interesa aranĝo. Temas pri neordinara ekspozicio, kie estis samtempe prezentitaj multaj lingvoj. Ĝi okazis en Svislando, en la urbo Neuchâtel. Tie printempe naskiĝis alloga ideo. Temis pri estonta 10-jariĝo de la loka asocio "La lundoj de la Vortoj". La asocio regule kunvenas por aŭskulti prezentojn pri lingvoj kaj komunikado. Por tiu festo necesis koncepti ion en tri dimensioj. La artisto Ruben Pensa ricevis tiun taskon. Li imagis Babel-turon en alteco de 7 metroj. Sur ĝi estos ornamaĵoj – la frazo de la itala poeto Erri de Luca: "Ŝajnas al mi, ke per la multobligo de la lingvoj la horizontoj multobliĝas".

Ruben Pensa proponis, ke tiu frazo aperu en la plej diversaj lingvoj. La tradukoj estos sur la metala rubando ĉirkaŭ la lignaj pilieroj, kiuj formas la turon.

La alvoko estis farita. La membroj de la asocio "La Lundoj de la Vortoj"



kolektis la frazon en deko da lingvoj per diversaj rimedoj. Ili ankaŭ tradukis ĝin al Esperanto. Poste ili kontaktis la prezidanton de ILEI Mireille Grosjean. Ili petis ŝin kontroli la tradukon. Ŝi plenu-



Fotoj: Sonia Daubercies

mis la peton kaj decidis kunlabori en la iniciato pere de Esperanto. Mirejo dissidas alvokon tra diversaj kanaloj de ILEI.

La reagoj de esperantistoj ne devigis longe atendi ilin. Alvenis iom post iom la tradukoj, kelkaj aperis en tre estetikaj alfabetoj. Finfine post monato kolektiĝis abundaj respondoj kun la “magia” frazo. Entute Mireille kolektis tradukojn en 50 lingvoj! Jen bona interkultura sukceso de Esperantujo, ĉu, karaj legantoj? Poste nia prezidantino kontrolis, ke la tradukoj aperu en la kvar svisaj lingvoj kaj la ses laborlingvoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. Ja ILEI strebas ricevi agnoskon de tiu internacia instanco.

La 22-an de septembro okazis la ekspozicio. Ĝin vidis multaj lokanoj dum la celebrada ceremonio. Samtempe la loĝantoj festis ankaŭ la 20-jariĝon de la loka botanika ĝardeno.

La skulptaĵo staris dum monato centre

de la urbo Neuchâtel. Poste oni starigis ĝin en la botanika ĝardeno en la supera parto de la urbo, en verda kaj trankvila valo. Ĉiuj loĝantoj kaj gastoj de la svisa urbo Neuchâtel povas nun ian tempon lerni kaj praktiki 50 lingvojn. Vera interkultura sukceso, ĉu?

Karaj niaj legantoj, ĉu nun ŝajnas al vi, ke pere de Esperanto la horizontoj multobliĝas? Do, lernu kaj ĝuu ĝin!

Interkultura Mondo esprimas koran dankon al la prezidantino de ILEI Mireille Grosjean pro la disponigita novaĵo.

**Roumain**  
Am impresă ce prin multiplicarea limbilor se multiplică orizontul.

**Anglais**  
And so the multiplication of languages multiplies the horizons

**Portugais**  
Parece-me que com a multiplicação de línguas os horizontes se multiplicam.

**Allemand**  
Und jetzt, mit der Vervielfachung der Sprachen die Horizonte vervielfachen

**Suèdois**  
Mitt intryck är, att med mångfalden av språk blir horisonterna mångfaldiga.

**Croate**  
Čini mi se da se multipliciranjem jezika multipliciraju horizonti!

**Wolof**  
"Gis nga yokkute gi am ci laak yi moo yokk dig yi"

**Rumantsch Grischun**  
A mai pari che cun la multiplicaziun da las linguas sa multiplitgeschian ils orizonts.

**Rumonsch sursilvan**  
« El para che cun la multiplicaziun d'ils lungatgs semultiplitgeschian ils horizonts »

**Kurde**  
تێکهڵگەر ، به چۆن به‌ڕێزێته‌ر بوونێش زۆرێشانیان ، له‌سۆنگان چۆن به‌ڕێزێته‌ر ده‌بن.

**Italien** : Ecco che, insieme alla moltiplicazione delle lingue, si moltiplicano gli orizzonti.

**Français** : Et voici qu'avec la multiplication des langues, se multiplient les horizons.

**Esperanto** : Kaj jen, per la multobligo de la lingvoj la horizontoj multobliĝas.

**Russe**  
Мне кажется, что с увеличением количества языков горизонты расширяются.

**Farsi (persan)**  
فکر من به نظر من با افزایش تعداد زبان ها افق های متعدد را وسیع تر می‌کند.

**Japona**  
言語の多様化でもって視野が多様化するように思われる。

**Serbe**  
Чини ми се да се умножавање језика умножавају видљиви.  
(Čini mi se da se umnožavanje jezika umnožavaju vidici.)

**Arabe**  
يتبين ان تعدد لغات تفرق الافق

**Chinois**  
在我看来，通过语言的倍增，视野倍增。

**Espagnol**  
Me parece que al multiplicarse las lenguas, se multiplican los horizontes.

**SLOVENŠČINA**  
A čisto s vpiševanjem jezykov se vpiševata horizonty.





Renato Corsetti

# Va, pensiero/Flugu penso

**La plej kantata opera kanto en la historio de la mondo: *Va, pensiero/Flugu penso*.**

**O**pero estas laŭ la *Plena Ilustrita Vortaro*: “Muzika teatraĵo, konsistanta el parolaj partoj, kantoj akompanataj de orkestro kaj kelkafoje baletoj: *la operoj de Mozarto*; *granda opero* (sen parolataj dialogoj); *komika opero* (kun parolataj dialogoj); *farsa opero* (kun komedia temo)”.

Kvankam la opero evoluis ekde la 16-a jarcento kaj evoluis preskaŭ samtempe en Francujo, Germanujo, Britujo kaj Italujo, la kontribuo de Italujo dum la 19-a jarcento estis absolute plej granda, tiel ke ĝi estas rigardata kiel “la patrujo de opero”, kaj Giuseppe Verdi [ĝuzepe verdi] estas unu el la ĉefaj komponistoj. Unu el liaj operoj havas la titolon *Nabucco* [nabuko], itala formo de la nomo de babilona reĝo, konata ankaŭ kiel *Nabucodonosor*, kaj en Esperanto *Nebukadnecaro* laŭ Vikipedio kaj per similaj nomoj en aliaj lingvoj. Fakte la originala nomo en la akada ŝajne estis *Nabû-kudurri-ušur*, alivorte “Nabu, protektu mian unuenaskiton!”. Malgraŭ la longa nomo, li estis granda reĝo, per militis multajn landojn kaj kreis grandan imperion. Unu el la konkeritaj landoj estis la lando de la judoj, kiuj daŭre ribelis, pro kio ili incitis lian paciencon kaj li detruis la templon en Jerusalemo kaj forportis en ekzilon parton de la juda popolo. Guste la judaj sklavoj en Babilono kantas ĉi tiun kanton, dum ili memoras pri la perdita patrujo [fakte en la tiama Italujo la kanto estis uzita kiel patriotisma kanto kontraŭ la aŭstraj okupantoj de norda Italujo].



Infana opero Cinderella en Oslo, Norvegio



Infana opero King's Ransom, Britujo



Infana opero en San Francisko, Kalifornio

Opero *Aleko Jolanta* de Raĥmaninov kaj Ĉajkovskij, Slovaka ŝtata operejo





Valoras nun aŭskulti la kanton antaŭ  
ol plulegi. Estas pluraj versioj en la reto.  
Jen unu el ili [la vortoj en la itala povas  
utili por sekvi la kantadon]: <https://www.youtube.com/watch?v=XttF0vg0MGo>

## Va, pensiero

*Va, pensiero, sull'ali dorate;  
Va, ti posa sui clivi, sui colli,  
Ove olezzano tepide e molli  
L'aure dolci del suolo natal!  
Del Giordano le rive saluta,  
Di Sionne le torri atterrate...  
Oh mia patria sì bella e perduta!  
Oh membranza sì cara e fatal!  
Arpa d'or dei fatidici vati,  
Perché muta dal salice pendi?  
Le memorie nel petto raccendi,  
Ci favella del tempo che fu!  
O simile di Solima ai fati  
Traggi un suono di crudo lamento,  
O t'ispiri il Signore un concerto  
Che ne infonda al patire virtù!*

La traduko al Esperanto redonas la  
signifon pli-mapli fidele kaj estas same  
kantebla laŭ la sama muziko.

## Flugu penso

*Flugu penso per ora flugilo  
kaj vi ŝvebu sur maro kaj tero  
kie molas en dolĉa libero  
nia kara patrujo en for'.  
Kaj salutu Jordanon invitan  
kaj Cionon en ĝia humilo.  
Ho, la bela patrujo perdita  
ho, malĝoja missorta memor'  
Ora harpo de sorto-poetoj  
ne plu muta de arbo vi pendu  
la memorojn la niajn defendu  
kaj parolu pri inta la hor'.  
Laŭ la diaj destino-dekretoj  
vi eligu nun sonan lamenton.  
Dio volu koncertan momenton  
kuraĝige al nia dolor'.*



Giuseppe Verdi: Va, pensiero, Nabucco



Va, pensiero, Opera Ĥoro K&K, Berlino



Opero en Skota Nacia Operejo



"Fantomo de Operejo" en teatro-kvartalo  
Brodvejo en Novjorko, Usono



Opero en Ĉina Operejo en Pekino





# Emblemokreado por la ILEI-Kongreso

En la Politeknika Lernejo en urbo Subotica, Serbio, jam de kelkaj jaroj funkcias Esperanto-fakrondo. Ĝia ĉefa celo estas informado pri Esperanto, kiun ni atingas – interalie – per engaĝigo de gejunuloj en internaciaj konkursoj.

Nia lasta tiaspeca aktivado estis amasa partopreno en la emblemokonkurso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). 24 gelernantoj, kiuj studas grafikajn fakojn, dezajnis emblemojn por la 51-a kongreso de ILEI, en Madrido (Hispanio, 2018). Al tiu ĉi grupo aliĝis ankaŭ unu eksa lernantino de la Politeknika Lernejo, Emese Kovács Pécskai, kiu jam de jaroj diligente kaj kreeme partoprenas en Esperantaj projektoj kaj pri kiu la legantoj de *Juna Amiko* jam povis legi antaŭe. La gelernantojn mentoris tri fakaj instruistoj: Mirjana Mitrić, Tihomir Zoraje kaj Csaba Vörös, kaj organize kunlaboris Aranka Laslo, gvidanto de E-fakrondo de la lernejo. Entute ni sendis 37 emblemokreaĵojn.

La Estraro de ILEI decidis surbaze de la opinioj de ĵurianoj kaj resumo de pritaksoj de FB-publiko jene:

1. Eugenio Hansen (Brazilo) – la ilustraĵo montras lian verkon, kio fariĝis la emblemo de la madrida kongreso.
2. Mirko Nikodimovich (Italio) kaj Bailing Qiao (Ĉinio).



**ESPERANTO KAJ EDUKADO  
MADRIDO 2018**

3. Emese Kovács Pécskai kaj Jovan Veinović (ambaŭ el Serbio).

Ni estas tre ĝojaj pro la du niaj gejunuloj, kiuj gajnis la 3-an premion.

En tiu ĉi raporto menciindas la alia sukceso de la aktuala lerneja jaro. Eŭropa Centro de Modernaj Lingvoj (Konsilio de Eŭropo, Gratz, Aŭstrio) jam la duan fojon laŭdis la Politeknikan Lernejon kaj la Esperanto-societon “Tibor Sekelj” el Subotica pro la organizo de lingva evento okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj. La metiejoj okazis la 26-an kaj 27-an de septembro 2017 en la Politeknika Lernejo, kaj konsistis el kvizo pri lingvoj kaj informata prelego pri Esperanto, du hungare kaj unu serbe. La tri instruerojn partoprenis entute 81 gelernantoj kaj 6 profesoroj.

Laŭ la rezultoj de la reta voĉdonado por la grandnombraj lingvaj eventoj en 2017 (ne nur en Eŭropo) la evento en la Politeknika Lernejo ricevis la plej multajn voĉojn en Serbio, el entute 21 lingvaj manifestacioj en la lando.

**Aranka Laslo**



# Malstreĉiĝu kun *Juna Amiko*

## Braceleto el plasta botelo

En pasinta numero de *Juna Amiko* vi havis eblecon prepari memstare teleron el papera rimeno. Vi eksciis, ke oni povas doni duan vivon al makuluro kaj do utile eluzi tunojn da papero, kiujn ni ĉiuj arigas.

**N**un mi deziras instigi vin, ke vi donu ankaŭ duan vivon al eluzitaj plastaj boteloj. Ĉiu el ni ĉiujare forĵetas ĉ. 66 plastajn botelojn. Tiuj boteloj bezonas ĉ. 500 jarojn por malkomponiĝi. Ĉiujare en la mondo oni produktas 200 mil tunojn da plastaj boteloj! Tial, grava estas ilia recikligo.

Plastaj boteloj povas esti agrabla materialo por recikligo, ĉar ni povas fari el ili neripetablajn kaj solajn ekzemplerojn kiel florpotojn, birdonutrejojn, meblojn, juvelaĵojn kaj eĉ vestaĵojn. Fama firmao Levis Strauss kreis kolekton de ĝinzoj el reciklitaj plastaj boteloj kaj pletetoj. En ĉiu paro da ĝinzoj estas ĉ. 20 % da t.n. forĵetaĵoj, do ĉ. 8 plastaj boteloj.

Dediĉu iom da tempo por mem prepari belan donacon, eluzante plastan botelon. Dank' al indikoj de la jam konata al vi el pasinta numero de nia revuo Bożena Zajączkowska, vi memstare preparos originalan braceleton.



### Materialoj:

Plasta botelo, kolora gazeto, blankaj paperaj vištukoj, gluo por ligno, akrila lako, peniko.

### Priskribo de la realigo:

Eltranĉu el la plasta botelo strion en la formo de braceleto (vidu la foton 1). Algluu ĝin per 5 tavoloj da gazeto (vidu la foton 2). Pacience atendu ĝis ĉiu tavolo da gazeto estos seka por alglui sekvan. Je la sama maniero surgluu la gazetan braceleton per blankaj paperaj vištukoj (vidu la foton 3). Fine, kiam ĉio estos seka, laku la braceleton 5-6 foje (vidu la foton 4), memorante, ke ĉiun sekvan tavolon da akril-lako vi donos nur tiam, kiam estos seka la antaŭa. Lakado kaŭzos, ke nia braceleto estos pli solida kaj aperos sur ĝi koloroj (vidu la foton 5).

Vi certe konsentos kun mi, ke tiun botelan braceleton oni povas facile prepari. Ĝi estas malmultekosta, origina kaj neripetbla.

Ĉu vi scias, ke la brita artisto kaj ekologiisto Richie Sowa en Meksiko, sur la Karibia marbordo konstruis flotantan insulon el plastaj boteloj? Sur ĝi (vidu la foton) estis duetaĝa domo, tri strandoj,



1



2



3



4



5







sunforno kaj kompoŝtiga necesejo, sed en 2005 uragano detruis la insulon. La artisto rapide konstruis novan kaj pli grandan plastan insulon kun domo, tri strandoj, sunpaneloj, ondopelita lavmaŝino kaj sunpelita akvofalo kaj rivero. Vidu: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Spiralinsulo\\_kaj\\_%C4%9Cojksi-Insulo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Spiralinsulo_kaj_%C4%9Cojksi-Insulo)

Forĵetante botelon memoru bone ĝin dispreni, pli frue deprenante ĝian fermilon. Dank' al tiu malgranda gesto ĝia recikligo estos pli facila kaj pli malmulte-

kosta, ĉar tiam oni ne transportos aeron en plastaj boteloj.

Elektu pli grandajn botelojn, ekz. 1,5-litrajn, ĉar produktante ilin oni eluzas multe malpli da plasto, ol produktante 3 duonlitrajn botelojn.

**Malstreĉiĝu:** Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj ŝatokupoj kun priskribo, ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblon ekkoni ilin. **Małgosia Komarnicka**



## Japanaj enigmoj

En elementaj lernejoj oni instruas kaligrafion. Okaze de la nova jaro la maldekstra lernanto skribis: “Jarkomenca unua vendado”, kaj la aliaj du skribis “Novjara mondonaco”. Kiu skribis plej bele?



Kio okazas al la fenestro? Kia estas rolo de tiuj “brakoj”? – Ĉiuj fenestroj en tiu domo havas samajn “brakojn”. Antaŭ la Japana Katastrofo en 2011 ili ne ekzistis. Dum tiu grandega tertremo oni rimarkis, ke multaj konstruaĵoj estas malfortaj kontraŭ tiaj tertremoj kaj instalis tiajn brakojn, apogilojn kontraŭ tertremo. **Hori Jasuo**





Stefan MacGill:

# UEA – tutmondigo kaj rejunigo



**Kio estas tiu UEA, kiu tutmondigas kaj rejunigas sin? Nu, temas pri Universala Esperanto-Asocio.**

**T**iu Asocio, fondita en 1908, antaŭ 110 jaroj, estas la ĉefa kolekto por esperantistoj. UEA okazigas ĉiujare Universalan Kongreson (UK); en 2018 tio okazis en Lisbono, Portugalio. En la UK kunsidis la Komitato de UEA. Ĝi kuraĝis akcepti proponon de la Estraro pri signifa reformo de la kotiza sistemo per kiu oni fariĝas membro de la Asocio. Tio havis du ĉefajn celojn:

1) Fiksi kotizojn por la baza membreco multe pli proksime al la pagipovo de la personoj en la unuopaj landoj de la mondo.

2) Fiksi kotizojn, kiuj favoras la altirojn kaj aliĝon de pli da junuloj.

Ni klarigu nian titolon: Kio estas ‘tutmondigo’ kaj ‘rejunigo’?


**Tutmondigo:** Analizu la vorton: tutmond-ig-o. Tio, rilatas al la membraro de UEA, ke ĝi estu pli tutmonda. La nomo ‘universala’ esprimas la samajn ideojn; bonvenas homoj el ĉiuj mondpartoj. Sed la realo ĝis nun estis alia. El la suma membraro de UEA, 60% troviĝas en Eŭropo, 19% el prosperaj landoj (Kanado, Usono, Japanio, Koreio kaj Israelo), 11% en Latin-Ameriko (ĉefe en Brazilo), 6% en Azio, 3% en Afriko kaj 1% en MONA (Meza Oriento kaj Norda Afriko). Zamenhof skribis: ‘Por ke Asocio estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia’. La nova




kotiza sistemo donas al ni potencon ilon por eklabori, por ke la membraro iĝu vere internacia kaj universala.

**Rejunigo:** Analizu la vorton: re-jun-igo. La membraro de UEA estas bedaŭrinde tre maljuna, la averaĝa aĝo estas pli ol 60. Pli aĝuloj ege valoras, sed sen interveno la Asocio ne havos estonton. Tiu rezulto eĉ inkluzivas la junulojn en TEJO, kiuj ja formas parton de la membraro de UEA. Pri la alarmiga aĝo-distribuo, legu en revuo *Esperanto*, p 232-233, novembro 2015. La nova kotizsistemo donas rabaton de 75% al junuloj inter la aĝoj de 0 kaj 19, kaj rabato de 50% al tiuj inter 20 kaj 25-jaraj. Per tio prosperos kaj TEJO kaj UEA.

UEA kunlaboras forte kun la instruista ligo ILEI, kiu eldonas ĉi tiun revuon. ILEI fakte pioniris pri reformo de la kotizoj; jam antaŭ ses jaroj en Kunmingo, Ĉinio, ĝi akceptis 3-ŝtupan sistemon, antaŭulon de la nuna 5-ŝtupa sistemo de UEA.

Se per la nova kotiz-sistemo prosperas UEA, same prosperas ILEI kaj *Juna Amiko*.




 Membro de UEA  
 Membro nur de TEJO  
 Ne membro de UEA aŭ TEJO

Mapo, montranta landojn, kiuj havas landajn asociojn de Universala Esperanto-Asocio.

# Reforma krucenigmo

La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



Jen krucenigmo, kiu rilatas al la teksto de la antaŭa artikolo.

1		2	3	4		5	6	7	8
		9				10			
11				12				13	
14						15	16		
	17					18			
19			20		21				
22					23				
24			25						

R = uzu nur la radikon, do sen la finaĵo.

## Horizontale →

1. Unu granda celo de la nova kotiza sistemo de UEA, por ke la loĝantoj de diversaj mondopartoj estu pli egalece reprezentitaj en la asocia membraro (10)

9 Akademio Internacia de la Sciencoj (3)

10. Misfar', fuŝ' (4 R)

11. Vorto por pozitiva respondo.

12. Melodia son' (3 R)

13. Sankta Georgo (mallongigo: 2)

14. La frato de via patro aŭ patrino. (5)

15. Finmanĝinta kaj plena. (4)

17. \_\_alo, \_\_menco, \_\_lego.

18. Femalon (4).

19. Unu granda celo de la nova kotiza sistemo de UEA, por ke la averaĝa aĝo de membroj fariĝu malpli alta.

22. Rase, homgrupe. (4)

23. Prezenti al iu ion: 'Mi \_\_\_as al vi novan ĉemizon.' (3)

24 Ridgaso – nitro-oksido (mallongigo: 2)

25. Antaŭeniri.

## Vertikale ↓

1. La junulara parto de UEA.

2. Farendajojn. 'La estraranoj de UEA devas akcepti multajn \_\_\_\_\_.'

3. Pronomo por indiki la parolanton. \_\_\_stero, \_\_\_lito, \_\_\_ras.

4. La solidajn partojn de via korpo – ili konsistigas vian skeleton.

5. La procezon de plia koncentriĝo de pezo aŭ aĵoj aŭ homoj: "Multloke en la mondo ni rimarkas la \_\_\_\_\_ de la popolo en urbaj regionoj, kiuj proponas laboreblojn.'

6. Vojaĝi de ĉi tie aliloken. 'Ĉu vi \_\_\_os al la sekva Universala Kongreso?'

7. Homo, kiu estas akceptita en la domo de alia persono. (5)

8. La 'O' de 'TEJO' (7 R)

16. Publike proklami. (5 R)

19. Korpoparta paro kiu filtras nian sangon. (3 R)

20. La Asocio, kiu akceptis novan 5-ŝtupan kotizan sistemon. (3)

21. Beba.



## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au). **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at). **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; [financoj@fel.esperanto.be](mailto:financoj@fel.esperanto.be). **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; [belabutiko@esperanto.org.br](mailto:belabutiko@esperanto.org.br). **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk). **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; [mrvp@interpre.org](mailto:mrvp@interpre.org); [ilei@espereto.com](mailto:ilei@espereto.com). **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz); [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz). **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; [strigo@esperanto.cl](mailto:strigo@esperanto.cl). **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; [arko.gong@qq.com](mailto:arko.gong@qq.com). **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; [arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com). **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee). **Finnlando:** Sylvia Hämäläinen, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi). **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; [esperanto-france@esperanto.org.net](mailto:esperanto-france@esperanto.org.net). **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; [wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de). **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de). **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com), [www.esperantohea.hu](http://www.esperantohea.hu). HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; [simio\\_2004@yahoo.es](mailto:simio_2004@yahoo.es). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; [esperanto@isl.is](mailto:esperanto@isl.is). **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; [saviogp@netvision.net.il](mailto:saviogp@netvision.net.il); [esperantisto@live.com](mailto:esperantisto@live.com). **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; [silkovojo@aliceposta.it](mailto:silkovojo@aliceposta.it). **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp). **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; [marija@hes-keu.hr](mailto:marija@hes-keu.hr). **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt). **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; [akbondhus@jkn.no](mailto:akbondhus@jkn.no). **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz). **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; [mtatara@gmail.com](mailto:mtatara@gmail.com). **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; [asocio@esperanto.pt](mailto:asocio@esperanto.pt). **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; [sezonoj@mail.ru](mailto:sezonoj@mail.ru). **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; [zciric2@gmail.com](mailto:zciric2@gmail.com). **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net). **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B Igh 1303, SE-931 38 Skellefteå; [leif.holmlund@telia.com](mailto:leif.holmlund@telia.com). **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch). **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; [rezamenhof@yahoo.com](mailto:rezamenhof@yahoo.com). **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg). **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; [usa@esperanto-usa.org](mailto:usa@esperanto-usa.org). **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; [uea@uea.org](mailto:uea@uea.org). **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com).



